

BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 1

Januaro/Februaro 1975



Villach nia kongresurbo



La ĉefstrato de Villach

Villach atendas la 27an IFEF-kongreson

Inter la 10a kaj 16a de Majo 1975 la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF) okazigos sian 27an postmilitan kongreson. Gastigontoj estas la aŭstraj gekolegoj, kiuj invitis al Villach, la bele situanta urbo en la provinco Karintio.

Sendube sekvos la afablan inviton multaj membroj kaf familianoj el la Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA) des pli multe, ĉar la kongresurbo estas — kompare kun la lastjara vojaĝo — relative facile kaj baldaŭ atingebla. La vojo kondukas por la plej multaj tra Salzburg, la mondkonata barokurbo, kiu akceptos la postkongresanojn. Post pluaj kvar horoj per la fervojo la urbo Villach estas atingota. La kongresanojn atendos nova, tre taŭga kongresdomo en la urbocentro, 10 minutojn piede de la stacidomo, kaj ĉiuspecaj hoteloj aŭ gastejoj. Kiel kutime la kongresa programo antaŭvidas oficialajn partojn ekz. la tradicion malfermon en la ĉeesto de honorgastoj, laborkunsidojn, fakprelegon, ekspozicion, sed okazos ankaŭ kulturaj, folkloraj kaj turistaj aranĝoj, pri kiuj la programo donas detalajn informojn.

La allogo de la regiono Karintio bazas sur klimataj preferoj. La urbo Villach estas ŝirmata per la alpa remparo kaj posedas mildan klimaton. Tra la urbo fluas la rivero Draŭ, la plej ĉefa en Karentio. Nur kelkajn kilometrojn for situas la vaste konata kuracbanloko Warmbad Villach, kies termoj estis konataj jam antaŭ du mil jaroj. Ili produktas ĉiutage 15 milionojn da litroj de kuracpova akvo. La urbo Villach, menciita unuafoje en la jaro 878, memorigas pri varia historio, kiel atestas multnombraj konstruaĵoj. Nin germanojn aparte interesas, ke Villach apartenis de la jaro 1007 ĝis 1759, do dum pli ol 750 jaroj, al la ĉefabatejo Bamberg, kiam episkopoj samtempe regis kiel teritoriaj aŭtoritatuloj.

En la kadro de la turista programo la kongresanoj havos ankaŭ la okazon ekoni la ĉirkaŭon de Villach. Unu el la ekskursoj kondukos al la Alpo de Villach kun ĝia giganta monto Dobratsch (Dobraĉ). La aŭtobusoj grimpos novan straton ĝis alteco de 1732 metroj. De tie oni povas veturi ĝis preskaŭ la pinto de la monto Dobratsch kun ĝia

respektinda alteco de 2 166 metroj. Oni vidas la Juliajn kaj Karniajn Alpojn, la Nordajn Kalkalpojn, la kroatajn USOK-montaron kaj la Alpojn de la Ötztal. En la jaro 1348 la suda parto de la monto falegis en la profundecon sekve de tektona tertremo. Miloj da homoj devis morti; 17 vilaĝoj, 3 kasteloj kaj 3 preĝejoj pereis. Ankoraŭ nun estas videblaj laŭlonge de la rivero Gail grandaj rokoj kaj ŝtonegoj, ŝtonoj testoj pri tiu terura katastrofo.

La bildo pri Karintio kiel lando de lagoj kaj montoj estus nekompleta, se la kongresanaro ne povus viziti la grandiozan lagon de Wörth, kiu havas longecon de 17 km. Unu el la plej konataj banlokoj ĉe la lago estas Velden. Vizitota estas ankaŭ la urbo Klagenfurt, kiel la IFEF-kongreso fermiĝos. Malpli konata, sed alloga celo estos Minimundus. Tiel nomiĝas tereno, kie troviĝas, en malgrandigita formato, kopioj de famaj konstruaĵoj en naŭ eŭropaj landoj. Per via vizito vi subtenos ankaŭ la socialan organizon „Savu la infanojn“.

Tiu kongreso okazos denove en la kadro de la Internacia Federacio de kultur-flegantaj fervojistoj (FISAIC) kaj staros sub la honora protekto de la aŭstra trafikministro. Certe la partoprenontoj travivos elstaran IFEF-kongreson kaj helpos tiamaniere demonstri la praktikan valoron de la Internacia Lingvo inter diversnaciaj fervojistoj. W.B.

Interesa aranĝo en Villach

En la pasinta IFEF-kongreso en Tarragona oni aranĝis „forumon“, novan programeron en niaj kongresoj. Ĝi fakte fariĝis tre interesa kaj ŝajnas taŭga rimedo por kompletigi la spertojn kaj observojn fari-tajn en kongreslando.

Ankaŭ LKK Villach okazigos forumon. Jam nun ni atentigas niajn legantojn, speciale tiujn, kiuj kongresos en Majo, je tiu programpunkto kaj petas ilin, eluzi ĝiajn eblecojn. Ne necesos limigi sin je fakaj demandoj. Ofte ja ekzistas duboj kaj problemoj pri pli ĝeneralaj temoj. Tamen ĉiuj demandoj havu seriozan karakteron kaj ne embarasigu la aŭstrajn kolegojn, kiuj sendube faros ĉion por kontentigi la scivolon de siaj eksterlandaj „klientoj“.

Nia malnova kaj nova kasisto


Adiaŭo kaj Bonvenon

Sen multe da bruo, same kiel li laboris, nia ĝisnuna kasisto Kurt **Jentsch** transdonis sian respondecplenan taskon en aliajn, pli junajn manojn. Kvankam emeritulo jam de kelkaj jaroj, li ĝis nun daŭre helpis en la GEFA-estraro kaj administris la rimedojn de la asocio. Ne ekzistas multaj homoj tiom fidindaj, helpemaj, ĝentilaj kiel Kurt Jentsch. Kaj ekde la momento antaŭ 7 jaroj, kiam li senhezite transprenis sian taskon ĝis nun, kiam lia sanstato devigis lin, fordoni la ŝatatan oficon, li konsiderinde kontribuis al la bona funkciado de la estraro. Oni. ankaŭ ĉi-okaze memorigu, ke Kurt Jentsch estis kasisto de la 19a IFEF-kongreso en Fulda, kio estis tre komplika afero.

Sed decas konstati, ke li krome „provizis“ nian asocion jam dufoje per „Migra Ekspozicio“, kiujn li sola elpensis, skizis kaj fabrikis. Multaj el ni jam povis admiri tiujn ekspociojn okaze



Kurt Jentsch



Karl Bernhard

Uzina gazeto kaj „katakana“

Ne estas io eksterordinara, ke kelkaj fabrikoj eldonas propran gazeton al la kunlaborantoj kaj komercistoj. Tiel ankaŭ la feruzino Düker en Laufen.

Krom ĝeneralaj komunikaĵoj en la gazeto „Düker-Nachrichten“ oni povis legi, ke komerca amiko el Hannover gastigis junan japanan

sinjorinon. Ŝi parolis krom sia gepatra lingvo la internacian lingvon Esperanto. Sian restadon en Hannover uzis la vizitantino el la Malproksima Oriento, por iomete konatiĝi kun la germana lingvo. Instruilo estis la „Düker-Nachrichten“. Post ioma trastudado de la gazeto fraŭlino Kazue laŭdis per Esperanto: „La fabriko eldonas bonan gazeton“. Krome ŝi skribe ripetis tiun

de niaj jarkunvenoj kaj aliaj aranĝoj. Sed ĉi tiun karan „ĉevaleton“ Kurt Jentsch certe plurajdos.

Restas al ni nur danki al li pro tio, kion faris por nia asocio kaj deziri al li, ke tamen lia sanstato ne turmentos lin tro akre, sed ke li havu ankoraŭ multajn agrablajn jarojn hejme kaj komunajn tagojn en la mezo de siaj malnovaj amikoj.

Kaj nun — bonvenon al la nova kasisto, kiu tamen ne estas nova. Karl **Bernhard**, loĝanta en Ludwigshafen, jam dum kelkaj jaroj estis distriktkomisiito en la BSW-distrikto Mainz, ĝis kiam tiu distrikto ĉesis ekzisti. Tiam li fariĝis „senlaborulo“ aŭ almenaŭ preskaŭ, ĉar en sia nova distrikto Karlsruhe li ekhelpis al la distriktkomisiito. Kiam ni petis lin posteuli Kurt Jentsch, li simple diris „Jes“, kaj ni estas konvinkitaj, ke la asociaj rimedoj trovis bonan lokon en liaj manoj.

Prezidanto

frazon per siaj hejmaj skribsignoj „katakana“. Pri tio eksciis la redakcio kaj opiniis, ke la gazeto eĉ servis kiel instrumaterialo.

Kompreneble ni ne volas reteni al niaj legantoj tiun specialaĵon, skribis la „Düker-Nachrichten“.

el germanlingva raporto de
O. Rösemann
trad. de O. Busse

3 distriktoj ĉesis ekzisti
 Sekve de la konsiderindaj organizaj ŝanĝoj ĉe la Germana Federacia Fervojo fine de 1974 ĉesis ekzisti la BS-distriktoj

Kassel, Münster/Westf. kaj Wuppertal.
 Konsekvence ankaŭ la 3 distriktkomisiitoj Konrad

Tasler, Joachim Schrappe kaj Willi **Graß** „perdis“ siajn respektivajn oficojn. Al ĉiuj tri estu esprimita la plej sincera danko de la asocio, ĉar ĉiuj jam de jaroj plenumas tiun oficon. Krome kolego Schrappe ofte helpis, kiam specialaj taskoj estis plenumendaj, dum

kolego Graß delonge estas membro de la GEFA-estraro, redaktante la Bultenon, kaj de kelka tempo ankaŭ vicprezidanto de GEFA. Pro tio ni estas certaj, ke ili ne perdiĝos pro tia organiza ŝanĝo, sed restos inter la aktivuloj de nia asocio.
 Prezidanto


Niaj ĝisnunaj distriktkomisiitoj



Tasler (Kassel)



Graß (Wuppertal)



Schrappe (Münster)

Aktuelles

Esperanto in der Bundesrepublik in 1974

1974 fanden in der Bundesrepublik Deutschland 4 wichtige **internationale** Esperanto-Veranstaltungen statt, nämlich der 59. Esperanto-Weltkongreß in Hamburg, eine Lehrerkonferenz in Sonnenberg, eine Konferenz der Esperanto-Jugend in Münster und der Internationale Kongreß blinder Esperantisten in Hamburg. Dabei wurden wertvolle Kontakte zu Politikern und Persönlichkeiten des öffentlichen und kulturellen Lebens geknüpft. In Verbindung mit der positiven Be-

richterstattung durch Presse, Rundfunk und Fernsehen ist so das Anliegen der Esperantobewegung auf viel Verständnis in der Öffentlichkeit gestoßen. Als Folge konnten zahlreiche Esperantokurse in Schulen, Volkshochschulen und an Universitäten durchgeführt werden. Sehr bemerkenswert ist die Tatsache, daß sich auch immer mehr Wissenschaftler für Esperanto interessieren.

Wissenschaftlicher Beirat konstituiert

Anlaßlich einer Gemeinschaftstagung zwischen der deutschen Sektion des Europäischen Erzieherbundes und der Arbeitsgruppe „Interlinguistik und Sprach-

kybernetik“ der Gesellschaft für Programmierte Instruktion (GPI) konstituierte sich der wissenschaftliche Beirat für die im Frühjahr 1975 beginnenden internationalen Schulversuche mit Esperanto in Westeuropa. Der Beirat besteht aus 18 Mitgliedern aus dem Bereich der Wissenschaft und 6 Mitgliedern aus Politik und Verwaltung aus insgesamt 8 Ländern.

Erste Esperanto-Gaststätte in der Bundesrepublik

Das Restaurant „Tönnchen“ in Paderborn, Kasseler Str.1 bietet nunmehr seine Speisen und Getränke auch auf Esperanto an. Der Esperanto-Name der Gaststätte ist „Bareleto“.

Neuer Name der „Germana Esperanto-Revuo“

Die Zeitschrift erscheint ab Januar 1975 unter der Bezeichnung „Europa Esperanto-Revuo“.

Esperanto in der Kybernetik

Das Paderborner Institut für Kybernetische Pädagogik (Direktor Prof. Dr. H. Frank) hat den audiovisuellen Lehrautomaten Robbitmat-2 entwickelt, für den gegenwärtig Esperanto-Programmhefte geschrieben werden.

Zusammengestellt
aus Pilo-Press
Gießner

Nova prezidanto de la fervojista ekzamena komisiono

Mi naskiĝis la 5an de Marto 1925 en Fulda, vizitis la elementan lernejon kaj la gimnazion en Fulda kaj militservis de 1943 ĝis 1944. Dum la militkapiteco (1944–1946) mi estis interpretisto ĉe la usona armeo. Poste mi vizitis denove la gimnazion en Fulda kaj finis per la abiturienta ekzameno kun bona rezulto, precipe en la angla lingvo.

Ek de 1947 mi laboris ĉe la Germana Federacia Fervojo. Post trijara prepara tempo mi trapasis en 1951 la ekzamenon kun bona rezulto por iĝi „Reichsbahn-Inspektor“. Sekvis en 1965 la promocio al „Bundesbahn-Oberinspektor“ kaj en 1969 al „Bundesbahn-Amtmann“. Ek de 1964 mi deĵoras kiel fervoja fakinstruisto. Mi unue partoprenis pedagogian kurson kaj post bona provinstruo akiris la instruan kapablencon. Mi libervole partoprenis interalie po du semestrojn en pedagogio kaj pedagogia psikologio. Mi aldonas la koncernajn atestojn. Mi lernis Esperanto en 1951 en la fervoja faklernejo de

Fulda. En 1953 mi plenumis la ekzamenon pri lingva kapableco. Mi partoprenis kelkajn UEA- kaj multajn IFEF-kongresojn. Dum la Internacia Jaro de Edukado en 1970 mi preparis originalan prelegon en Esperanto pri la klerigado ĉe la eŭropaj fervojoj. Pri tiu temo mi prelegis en la kadro de la fakprelegoj dum la IFEF-kongreso 1970 en Rimini kaj 1971 en Maribor. Mi kunlaboris en la organizado de esperantistaj aranĝoj en Fulda, nome la 1a jarkunveno de GEFA en 1957 kaj la 19a IFEF-kongreso 1967 kiel LKK-membro. En la estraro de la loka Esperanto-Societo Fulda mi laboras ek de 1955. Ek de 1965 mi estas ties prezidanto.



Fritz Lautenbach

En 1974 per la Germana Esperanta-Instituto mi estas nomita ekzamena komisaro kaj iĝis la prezidanto de la fervojista ekzamena komisiono. Unua ekzameno de la nova komisiono okazis dum la jarkunveno 1974 en Bamberg.

Fervojajn novajojn

En Ĉinio oni aĉetas germanajn lokomotivojn

Nun veturas germanaj dizellokomotivoj en Ĉinio. Grupa da germanaj fervojingenieroj estis en la ĉina popolrespubliko por instrui la ĉinojn kiamaniere oni funkciigas 36 tute modernajn 5500 ĉevalfortajn dizellokomotivojn. La lokomotivoj unuavice estas uzataj por vartransporto kaj laŭ montarlinoj. Kaj la fervojoj kaj la vojoj en Ĉinio estis eluzitaj, sed nun oni ege streĉas sin por plibonigi la komunikilojn tio estas parto de la unua 5-jara plano.

Sprachprüfung in Bamberg

Die angemeldeten Prüfungsteilnehmer Frau Ursula Schripp, Münster i. W., die Herren Werner Heimlich jr., Soltau u. Manfred Retzlaff, Münster i. W., haben ihre Befähigung unter Beweis gestellt und die Prüfung bestanden. Herzlichen Glückwunsch GEFA-Vorstand

27. IFEF-Kongreß in Villach

Die Tagesordnung und weitere Bekanntmachungen, bitten wir in IF1/1975 nachzulesen.

16-a Eŭropa Feriosemajno en Svislando (EFS)

Ĝi okazos de la 31-a de Aŭgusto ĝis la 6-a de Septembro 1975 sur Fürigen apud Stansstad ĉe Vierwaldstätter-lago kaj estas organizita de Svisa Asocio de Esperanto - Fervojistoj (SAEF). La semajnpromprogramo konsistas el antaŭtagmezaj Esperanto-lecionoj trigradaj, gvidataj ekskursoj variaj kaj vesperaj aranĝoj distraj. Anoncojn kaj informetojn oni adresu al:

S-ro Ernst Glättli,
SAEF-sekretario,
Laurstraße 17,
CH-5200 BRUGG.

**Estraro kaj komisiitoj de la unuiĝo Germana Esperanto Fervoĵista Asocio
en la Sociala Organizo de Germana Federacia Fervoĵo**
Stato: Januaro 1975

Estraro

Prezidanto: BOAmtm Gießner, Bf Herzberg (Harz); Basa 949/887/391

Vicprezidanto/Redaktoro:

BAmtm Graß, BD Köln - F-Büro, F 60 -; Basa 943/1242 privata adreso: 565 Solingen 11, Meteorstraße 13

Sekretarino: BHS'in Kruse, Sozialamt Frankfurt/Main; AA 517; Basa 955/3280

privata adreso: 6 Frankfurt/Main 74, Wienerstraße 21

Varbado/Informado:

TBAmtm Brandenburg, Hbm Münster (Westf.); Basa 945/397

Kasisto: BS Bernhard, Bf Frankenthal; Basa 954/834/25

Distriktkomisiitoj

Essen: BOS Bartz II, Bf Dortmund-Hörde; Basa 944/800/718/55 aŭ 800/809/14

Frankfurt/Main: BOAR Dr. Lang, Pa bei der BD Frankfurt/Main; Basa 955/1501 aŭ 5788 ek de 1.5.1975: BAmtm Kiefer, ZVL Frankfurt/Main, AA 5529; Basa 955/3764

Abiturienta ekzameno ankaŭ en Esperanto

Komisio de la Asocio de Germanoj Esperanto-instruistoj, Harald Schicke, juna esperantisto el Hamburgo, en decembro pasintjara varbis por Esperanto en germanaj universitatoj kaj pedagogiaj lernejoj. Li vizitis la universitatojn en Bremen, Frankfurt, Majenco kaj Münster, kaj alternejojn en Paderborn, Darmstadt, Dortmund kaj Kolonjo. Li speciale kontaktis la estrojn de lingvolaboratorioj, por sondi

Hamburg: BOAmtm Lepke, BD Hamburg - B-Büro -; Basa 947/1581 aŭ 5569

Hannover: BHS Heimlich, Bm Soltau; Basa949/850/127
Karlsruhe: BOAmtm Hug, BD Karlsruhe - Ps-Büro Ps 26; Basa 953/5005

Köln: BOI Herlitze, BD Köln, Büro B (Ozl); Basa 943/473

München: Vorhdw Weidacher, Bw München-Ost; Basa 962/834/553 aŭ 566

Nürnberg: BHS Müller, Bahnpolizeiwache Hof, Bp-Posten Lichtenfels; Basa 966/844/388

Regensburg: TBAmtm Röder, BD Regensburg - T-Büro - Th 8; Basa 965/5858

Saarbrücken: BHS Müller, Ps-Büro, Basa 956/5663

Stuttgart: TBAmtm Krüger, Bw Heilbronn; Basa 952/822/328

Apartaj komisiitoj

Lingvaj ekzamenoj kaj

Instruado: BAmtm Lautenbach, BA Fulda; Basa 957/822/243

Fakterminaroj: BOAmtm Ritterspach, ZVL Frankfurt/

la eblecojn pri Esperanto-intensivkursoj.

La lokaj gazetoj ĝenerale tre detale raportis pri la varbado de Harald Schicke kaj publikigis favorajn artikolojn pri Esperanto. Speciale oni akcentis, ke li estas la unua germana abituriento, kiu ankaŭ estis ekzamenita en Esperanto. (Pilo)

Jubileo de Munkena klubo.

Aŭtune 1974 la Esperanto-klubo en Munkeno (FR-Germanujo) festos la 70-an datrevenon de sia fondaĵo.

Main, AA 5005; Basa 955/3680

Junularaferoj: BS Heimlich, Ga Soltau (Hannover); Basa 949/850/113

Biblioteko kaj gazetkolektado: BOI Rösemann, BD Hannover, Bf 70, Basa 949/2378

Bulteno-dissendo: BOS Schindler, Bf Schwelm (Köln); Basa 946/848/126

Arkivo: BOS Barmaneter, Bf Woringen (Schwaben) - über Memmingen - Bez. München; Basa 964/824/365

Peto al la eksterlandaj geamikoj!

Ĉi maldekstre ni komunikas la aktualan adresaron de la GEFA-estraranoj kaj de la distriktaj komisiitoj. Bonvolu korekti vian liston kaj eventuale ŝanĝi la preparitajn adresojn por garantii la akuratan akcepton. Se vi mem havas dezirojn rilate la akcepton de nia BULTENO, ni urĝe petas informi nian sekretariinon.

**TURISMO KAJ HUMORO
Ĉe la doganejo**

— Nekredble! Via valizo estas malplena . . . — miras doganisto.

— Nenio miriga, mi estas nudisto . . .

En Luvro

Usona familio rigardanta Luvron en Parizo haltas antaŭ egipta mumio.

— Kion signifas 1348 AV? — demandas la edzino.

— O, tio sendube estas la numero de la aŭto, per kiu oni akcidentis.

Redaktivo por n-ro 2/1975 estas la 25.3.1975